VENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET
'EDA ESPERANTO-FEDERACIO
:GELBACKEN, STOCKHOLM
L. 20 00 43 - POSTGIRO 20 12

Porinforme al la estraranoj de SEF.

El letero de "Hofrat" Hugo Steiner, Wien al E.M.

1. Por 1946 en konsento kun nia registaro, kiu konsistas po triono el viroj de la 3 demokrataj partioj socialdemokrata, popolpartia, komunista, ĝis la elektoj, kiu donos certe alian bildon, Aŭstria Esperanto-Asocio invitas la Universalan Kongreson de Esperanto al la Mozart-urbo Salzburg, por ebligi al la samideanaro la partoprenon en la festludoj, kio alie ankaŭ nun post la terura milito ne facile estas ebla. Afable subtenu nian inviton ĉe IEL.

2. Nutraĵ-pakaĵ-helpagado.

En nia lando nun regas sufiĉa manko je nutraĵoj kaj helpo tuja por la esperantistoj ne nur helpos el niaj enlandaj samideanoj sed ankaŭ faros gravan impreson al la publiko kaj la reprezentantoj de la 4 okupantaj grandpotencoj, ĉar laŭ nia scio tia agado ĝis nun de neniu flanko estas jam entreprenata. Se ĉiu familio donus iom por ĉi tiu entrepreno, ni ankaŭ nin turnas en tiu afero al Anglujo, Francujo kaj Svisujo, la sukceso estos grandioza kaj niaje sperantistoj ricevos almenaŭ iom da krom-nutraĵoj. Ni aldonas proponon.

Bonvolu informi min, ĉu vi entreprenos la aferon aŭ al kiu vi ĝin transdonis, ĉu la Landaj Organizaĵoj? Espereble la afero sukcesos. Bonvolu tiam tuj, kiam ĝi marŝas, informi min, por ke mi povu entrepreni la necesajn paŝojn pri la disdonado de la pakaĵoj kaj pri senpaga transporto tra la aŭstriaj provincoj. - La registaron mi jam informis, ke mi entreprenas ĉi tiun helpagadon ĉe niaj amikoj en via lando kaj la aliaj menciitaj.

3. Ĉu eble estos la ebleco sendi denove esperantistajn infanojn en vian landon por kelktempa restado?

4. Tutmonda Adresaro de la esperantistoj.

En 1938 mi eldonis TAE kun la promeso, reeldoni ĝin ĉiujare. Bedaŭre Hitler malebligis ĉi tion. Sed nun mi ricevas la pres-permeson de la registaro kaj mi reeldonos TAE 1946 je la mortotago de Zamenhof en aprilo 1946. Multaj adresoj ne plu estas ĝustaj, multaj mortis, fugis, estas murditaj, formigris. Kapti la adresojn de kiel eble plej multaj esperantistoj ne nur estas mia intenco sed ankaŭ granda valoro por nia movado kaj speciale por IEL. Sed por tio mi unue bezonas la helpon de la landaj organizaĵoj. Do helpu ankaŭ vi:

a) necesas la adresoj de la E-organizaĵoj kaj grupoj en via lando,
b) la adresoj de la unuopaj samideanoj en via lando
c) la adresoj de al viaj samideanoj konataj esperantistoj en aliaj landoj, por ke ni povu inviti ilin al TAE

Krome mi petas, instigu ke kiel eble ĉiu esperantisto vialanda

a) enpresigu sian adreson, apartenecon al organizo, po persono 1 svfr.
b) enpresigu sian adreson kaj mendu la libron TAE 1946, entute 2 "
c) enpresigu anonceton po linio kun 30 literoj sv.fr. 1:-.
d) kolektu eventuale anoncojn de firmaoj por TAE: 1/1 paĝo 100:- "

Por a), b), c) la peranto ricevos 10 %, por d) 20 % por sia laboro.

5. Internacia Esperanto-Muzeo.

La Muzeo ekzistas, nenio pereis per Hitler kaj la bomboj. La funkciadon mi ekos fine de septembro 1945. Novajn ejojn ni ricevos en Alte Hofburg, ankoraŭ pli inda loko por la Muzeo.

6. Lernolibroj, vortaretoj germanlingvaj.

....Mi nun ricevis permeson presigi .....

a) Lernolibro "Ĝojo per Esperanto" verkita de mi, en 2-a eldono, prezo kun afranko sv.fr. 2,20.
b) Esperanto-ŝlosilo germana kaj 48-paĝa vortareto germane-Esp. ambaŭ kune kun afranko 0,40 sv.fr.

.....